§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro : 3 2022

EFEKTIVIGO DE LA PRINCIPO DE UNIVERSALA JUSTICO FARE DE GERMANA TRIBUNALO

Tribunalo en la germana urbo Koblenzo juĝis la eksan sirian generalon Anwar Raslan. La Tribunalo konsideris, ke li estis kulpa pri torturoj, kontraŭleĝa retenado kaj seksaj perfortoj. La juĝo asertas, ke ĉi ĉio okazis ĉe malliberejo de la sekretaj servoj en Damasko (Sirio), tie oni malliberigis 4000 homojn, almenaŭ 30 el ili mortis.

La Alta Komisaro pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, la eksa ĉilia prezidanto Michelle Bachellet, deklaris, ke ĉi tiu juĝo estas paŝo antaŭen cele la determinon de respondecoj rilate la aŭtorecojn de la deliktoj kaj la helpon al la viktimoj en lando, kie okazas milito de antaŭ pli ol dek jaroj. Krome, ĉi tiu juĝo estas averto al siriaj aŭtoritatuloj, ĉar tute ne gravas la pozicio aŭ rango tenita de tiuj kiuj torturas aŭ plenumas gravajn perfortojn kontraŭ homaj rajtoj. Tiel, antaŭe aŭ poste, ĉiuj devas respondi por siaj agoj en sia lando aŭ eksterlande.

Laŭ la Alta Komisaro de Unuiĝintaj Nacioj, la universala efektivigo de la justico estas nepra afero en nia mondo. Laŭ tiu principo, tribunaloj de aliaj ŝtatoj rajtas juĝi milit-krimulojn aŭ la kaŭzantojn de krimoj kontraŭ la homaro, spite al la fakto, ke tiuj krimuloj ne plenumis siajn deliktojn ĉe la ŝtato juĝanta ilin.

En ĉi tiu afero, la efektivigo de universala justico estas fundamenta, pro la fakto, ke Sirio ne estas membro de la Internacia Pun-Kortumo, krome la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj ne atingis necesan kvorumon por la pristudo de la kazo de la eksa siria generalo en tiu kortumo. Laŭ la Alta Komisaro, ĉi tiu juĝo estas klara ekzemplo pri la rolo ludebla de naciaj tribunaloj, kiuj povas kaj devas solvi la problemojn de internaciaj kortumoj rilate la efektivigon de justico.

Vorto de la Semajno

Agokapablo: Eco ĝuata de, ĝenerale, plenaĝulo por plenumi devojn kaj peti la efektivigon de rajtoj, kiu atribuas juran efikon al tiuj aktoj.

En kelkaj ŝtatoj agokapablon oni atingas je 18-jara aĝo, en aliaj estas necese esti almenaŭ 21-jaraĝa.

Favore al heredontoj, juĝisto povas nuligi la agokapablon de tiu, kiu disipadas siajn havaĵojn.

Infanoj ne disponas pri propra agokapablo, pro tio estas necesa la ĉeesto kaj akcepto de la gepatroj, en tiuj leĝaj aferoj kiuj povas koncerni ilin.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo havigas senpage sian oficialan revuon al membroj kaj simpatiantoj de IJEA.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la organizo kiu disvastigas la internacian lingvon en Andaluzio, lando sude de Hispanio. De antaŭ multaj jaroj, tiu asocio aktive kunlaboras kun IJEA en la eldonado de publikigaĵoj kaj subteno de nia TTT-paĝo. Nun, AEU proponas al membroj kaj simpatiantoj de IJEA ricevi sian oficialan organon, temas pri la revuo ***GAZETO ANDALUZIA***, ĝi aperas 4-foje en la jaro kun, averaĝe, 50 paĝoj en ĉiu numero. Se Vi deziras ricevi ĝin rete, bv. kontakti kun cordoba@esperanto.ac